

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 9.5.2012

La unuaj damoj - sorto, vivodevo, destino.

Věra Podhradská

Pozicia ekzisto de la unua damo estis ĉiam tre kontrolita, ofte vualita en sekreto. Sorto de Unuaj damoj estis laŭ certa epoko. Plej ofte estis dezirata ilia reprezentado. Kaj ĉiu faris laŭ sia volo tiel, kiel permesis kondiĉoj, inteligenteco kaj personeco.

Charlotta Masarykova naskiĝis en Brooklyn en jaro 1850 kiel filino de riĉa usona komercisto kaj kunposedanto de asekura kampanio Rudolph Garrigua. Ŝi naskiĝis kiel tria el 11 infanoj. Kiam ŝi estis 17-jara, ŝi forveturis studi konservatorion en Leipzig, kie en la jaro 1877 ŝi konatiĝis kun Tomáš Masaryk. De komence ili parolis angle, sed tuj en la unuaj jaroj de ilia geedziĝo, el kiu naskiĝis 4 gefiloj, ŝi rapide ekparolis la ĉeĥan lingvon, kaj ankaŭ al kutimiĝis al ĉeĥaj sintenoj. Ŝi tre ŝatis librojn de K.H. Borovský, B. Němcová, J. Neruda, P. Bezruč, fariĝis admiranto de B.Smetana, parolis al virinaj aferoj en ĉeĥaj landoj, kun sia edzo ŝi spertis lian kontraŭaŭstrian rilaton - ŝi fariĝis el Usoninano Ĉeĥino, morale kaj politike.



Ŝia usona deveno faciligis al Masaryk dum la unua mondmilito multajn traktadojn ĉefe en Usono. La tradicio de familio de Charlotta malfermis pordojn de gravaj aferoj kaj subtenis en tuta mondo simpatian por „nekonata lando meze de Eŭropo“.

Al juna paro naskiĝis kvin infanoj. Ŝatata filino Hanička baldaŭ post naskiĝo mortis.

S-ino Masarykova estas en la mondo fame konata batalantino por samrajtigo de virinoj kun viroj.

Pro tio Masaryk envicigis en la unuan Konstitucion de Ĉeĥoslovakio samajn rajtojn por virinoj kaj viroj. Masaryk kun sia filino Olga emigraciis, li volis plene dediĉi sin en kontraŭhabsburka rezista movado kaj volis sian familion gardi antaŭ polica persekuto. Sed li tamen ne sukcesis. Ĉe lia familio ripetadis policaj hejmaj kontroloj kaj en novembro 1915 estis Alice arestita. En la sama jaro mortis ŝatata filo Herbert pro tifo. Depresioj ĉe Charlotta fondiĝadis, tamen ŝi psiĥe subtenadis la arestitan Alice per siaj leteroj. Patrino kaj filino renkontiĝis en julio 1916 kaj de tiu tempo jam estis kune. Kiam Charlotta estis enhospitaligita en sanatorio, Alice transprenis zorgojn pri dommastrumado.

Post reveno de sia patro kaj lia elekto kiel prezidento ŝi de temto al tempo anstataŭis sian patrinon, kiel unuan damon. Charlotta mortis la 13-an de majo 1923 kiel 73 jara.

Hana Benešová - fakte vera la unua damo (1885 - 1974)

Edvard Beneš estis dua ĉeĥoslovaka prezidento, sed nur lian edzinon akceptis publiko kiel fakte unuan damon.

La vasta publiko identiĝis kun ideo, ke tiu ĉi virino estis ne nur fidela edzino de dr. Edvard

Beneš, sed ankaŭ perfekta reprezentantino de ŝtato, alie dirite, ŝi estis vera la unua damo de sia lando. La nacio ŝin amis, estimis, kaj respektis.

Ŝi naskiĝis kiel Anna Vlčková en Domaslavice ĉe Osek, la 16-an de julio 1885. Ŝi devenis el malriĉaj kondiĉoj. Kiam ŝi estis 14-jara, komencis pri ŝi zorgi ŝia riĉa onklino, kiu ankaŭ prizorgis ŝian klercon kaj edukadon.

Kun Eduard Beneš, Anna la unuan fojon renkontiĝis en Parizo en la jaro 1905. Juna studento de Sorbonna tre plaĉis al ŝi. Jam tiam li estis bonega oratoro kaj ŝi sciis bone aŭskulti. Sed la „amromaneto“, kiu komenciĝis, ne estis laŭ lia imago. Li estis malriĉa, ambicia, havis antaŭ si grandajn planojn, kaj liaj intencoj estis, resti sen virinoj. Li estis malkomunikema kaj liaj rilatoj estis plej parte fremdecaj.

Sed baldaŭ li konsciis, ke tiu ĉi knabino ne estas por li apatia, sed li ne estis pro tio feliĉa. Tial li intencis la aferon fini. Sed lia parolo similis kiel edziĝpropono. Li timis, ke pro tio, ke li ne estas riĉa, povas onklino de Anna maljesi. Sed Anna mem decidiĝis kaj en la jaro 1906 en Parizo kun Eduard ŝi financiĝis. Beneš poste petis ŝin, ke ŝi ŝanĝu la nonom anstataŭ Anna al Hana, ĉar li havis kun certa knabino Anna malagrablajn rememorojn. Li mem fariĝis el Eduardo Edvard. Geedziĝo okazis en Prago en la preĝejo de sankta Ludmila la 10-an de decembro 1909. Tiam jam Beneš fariĝis doktoro de filozofio. Ilia edzeco montris unuiĝon, viro kaj virino en tutplena senco.



Hana kredis la pravon de politiko, kiun realigis Beneš en tre komplika ŝtato, plej parte dum ambaŭ mondmilitoj. Kune kun la edzo ŝi travivis ĉion malbonan, sed ankaŭ ĉion penadan kaj respondecan. Ankaŭ dum malfacilaj tempoj dum Mnichov 1938 kaj Februaro 1948, kiam li estis tute kaputa kun okuloj klinitaj al tero.

Malgraŭ tio, ke Hana kelfoje vizitis kuraclokojn, ne sukcesis naski bebon. Beneš estis en sia edzeco feliĉa kaj tute ne intencis ŝanĝi edzinon. Li igis fari por ili someran rezidejon en Sezomovo Ústí, kiu fariĝis ilia komuna ĝojo.

La 2-an den decembro 1974 Hana Benešová en sia loĝejo en Loretana placo en aĝo de 89 jaroj mortis.

Ŝia sepultado la 7-an de decembro fariĝis manifestacio kontraŭ normaliza reĝimo. Alparolis legiano generalo Mikuláš Čila, eksonis ŝtata himno, kiun komune kun Dana Medřická kaj Eduard Haken kantis ĉiuj ĉeestantoj. Finiĝis viva historieto de virino, kiu el ĉeĥa vilaĝo eniris ĝis al Praga burgo. Funcion - la unua damo - ŝi plenumis tiel bonege, ke fariĝis nesuperebla idolo por siaj postvenintinoj.

Marta Gottwaldová (1899-1953)

Marta Gottwaldová, edzino de „ unua laborista prezidento fariĝis „heroo“ de multaj popolanekdotoj. Laŭ tiama propagando al tiu ĉi proletara virino apartenas merito, ke privata vivo de Klement Gottwald estis tiel brila kaj harmonia, ke li povis ĉiujn fortojn dediĉi al laborista movado. Tio kompreneble estas nevera aserto. Vivo de Gottwald havis nenian harmonion kaj netrankvila Marta al tio frapante kontribuis. Traŭmatis ŝin multaj bagatelaĵoj. Kiam oni disipis multajn milionojn da kronoj por establi armeon kaj pezindustrion, aranĝis Marta en Burgo ĉefe problemojn de mastrumado tiel, ke nenion malŝparu. Idolon de Hana Benešová, kiun tuta popolo senĉese memoris, faris al Marta komplekson de malplivaloro. Ŝi ne volis esti alia. Pro tio ŝi mendis la samajn kostumojn. En kudristaj salonoj oni modelis artefaritan la saman figuron kiel Marta. Sed kostumoj aspektis malbele, ĉar la staturado de Marta estis tro korpulenta, la rezulto estis komika. Ŝiaj rilatoj kun Gottwald estis streĉaj. Sanstato de Gottwald ne estis bona, kuracisto rekomendis al li regulajn promenojn. Li volonte promenus kune kun sia edzino, sed ŝi ne tro ŝatis tiujn promenojn,

pro tio ŝi anstataŭ promenojn donadis al edzo alkoholaĵojn, kiuj por lia sano estis danĝeraj. Kiam Gottwald mortis, Marta estis tre ŝokita. La tutan tristan vojon tra Prago ŝi iris piede - tute ruiniĝinta. Dum kelkaj monatoj ŝi perdis 60 kilogramojn kaj post duonjaro ŝi ankaŭ forpasis.

Marie Zápotocká (1890-1981) Se Hana Benešová estis damo kaj Marta Gottwaldová imitis ŝin - Marie Zápotocká estis nek damo nek aktorino. Ŝi restis la sama - laborista patrino, zorgema, laborema kaj al sia edzo sindona.

Ŝanĝis nek kostumadon nek ideon kaj alveninte Burgon ŝi agis same. Marie Zápotocká pli poste mirige al siaj partiaj samaĝuloj, kelkfoje kondamnis aŭgustan invadon de sovetaj armeoj. Pro tio ŝi devis trovi multaj fortojn, ĉar ĝis tiu ĉi tempo ŝi komune kun sia edzo kredis al ĉio, kio devenis el Sovetunio, kiu por ŝi estis forta aŭtoritato. Sian edzon, simile kiel Hana Benešová, ŝi postvivis entute je kvaronjarcento.

Božena Novotná (1910-1980)

Privata vivo de la tria kaj lasta laborista prezidento Antonín Novotný apartenis inter plej sekretaj kaj sekreto rilatis precipe lian edzinon. Nek en libroj, nek en gazetoj pri ŝi oni ion skribis, fotoj aperadis nur malofte. Novotný estis por ŝi la unua amo kaj restis tutan ŝian vivon. Ili al kutimiĝis vivi modeste en praga periferio. Kiam Novotný decide de Chruščov post morto de Zápotocký fariĝis prezidento, ambaŭ timis „grandan“ politikon. Ili ankaŭ deziris, ke popolo estimu ilin, kvamkam al ili mankis saĝeco kaj bonkoreco. Novotný baldaŭ komencis disdonadi kovertojn kun financaj sumoj, eventuale timigis la homojn per diversaj agoj. Božena rapide kutimiĝis komandi kaj enigi sistemon de nepotismo, interveno, donacoj por siaj konatoj. Kiam poste Antonín Novotný devis en jaro 1968 rezigni pri la prezidenta funkcio, ŝia edzino tion sentis kiel maljustaĵon kaj personan senhonorigon.

Irena Svobodová (1901-1980)

Sinjorino Irena estis vera soldata edzino. Ŝi similis al Svoboda per sia obstina persisteco. Ŝi havis evoluantan senson pri sia devo, precizeco kaj akurateco. Ŝi ĉiam sciis pri kio temas. Plej esprimforte oni tion vidis dum ses jaroj en la dua mondmilito, kiam ŝia edzo foriris batali eksterlanden kaj ŝi tuj engaĝiĝis en interna rezistado, en kiu ŝi perdis filon, patrinon, fratojn kaj kelkajn aliajn parencojn.

La popolo en la jaro 1968 nomumis generalon Svoboda prezidento. Sepdektria generalo unue hezitis. Sed Irena diris „Ludoviko, vi devas ...“ kaj fariĝis lia motoro. Kiel la unua damo kompare kun aliaj tempoj ŝi tute ne ŝanĝiĝis. Unue ŝi iniciatis detruon de bariloj inter Belveder kaj Reĝa ĝardeno, per kiuj Marta Gottwaldova forigis sin de ekstera mondo. Post aŭgusto 1968 generala maljunaĝa organismo suferis lian laboron. Post abdiko li vivis ankoraŭ kvar jarojn dank' al prizorgado de sia edzino. Sinjorino Irena mortis post unu jaro.

Magda Husáková (1916 - 1966)

Gustav Husak havis du edzinojn. La unua - Magda forpasis 10 jaroj antaŭ ol li estiĝis prezidento.

Ŝi vivis kun li tridek jarojn, estis patrino de liaj du filoj kaj unu el malmulte da homoj, kiu sciis lin influi. Magda estis bela, klera, same ambicia kiel Husák, ŝia karaktero estis same sendependa kaj al komunisma ideo kredis same kiel edzo. Sed estis pli humana ol li. Pro tio ŝi foriris de juro al teatro kaj arto. Ŝi fariĝis aktorino kaj reĝisorino en tempo, kiam Husák estiĝis ĉefa politika persono en Slovakio.

Ekstrema por ili fariĝis la 6-a de februaro 1951, kiam Husak kiel burĝa nacionalisto estis arestita kaj por naŭ jaroj enkarcerigita. Magda devige forlasis teatron. Anime ŝi trovis anstataŭanton en aktoro Ctibor Filčík, kun kiu ŝi interamikiĝis dum kiam Husák estis ankoraŭ libera. Ĉe li ŝi ankaŭ trovis kvalitojn, kiuj al Husák mankis. Husák sciis pri sia rivalo, sed li pensis, ke post kiam li revenos, li inklinigos ŝin al sia flanko. Sed ne okazis tiel, tamen Husak kun ŝi ne divorcis. Post 6 jaroj Magda mortis.

Viera Husáková (1923 - 1977)

Kiam Gustav Husák estiĝis en jaro 1975 prezidento, liaj proksimaj kunlaborantoj igis lin edziĝi. La samon deziris ankaŭ Brežněv. Kaj proponis al li ĵurnalistinon Viera, kun kiu li konatiĝis en Kimrio, kien Husák akompanis lin por somera ripozo. Do Gustav Husák kun ŝi geedziĝis - antaŭ presidenta ŝtata vizito Indion. Tiu ĉi geedzeco daŭris nur du jarojn. Post tragika morto de Viera li jam vivis unusola. Al li restis nur ambicioj, forta volo kaj komunisma kredo.

Olga Havlová (1933 - 1996)

Antaŭ kiam Václav Havel fariĝis prezidento la unuan fojon en jaro 1989, lia edzino kontraŭstaris. Ŝi timis, ke „granda“ politiko per siaj meĥanismoj alsimiligos lin al siaj ideoj kaj li perdos ĉion, en kio li vidis sian plej grandan valoron - humanan identecon. Olga devenis el laborista familio. Por studi, ŝi ŝancojn ne havis, sed ŝi ankaŭ ne volis studi. Ŝi volis esti sendependa, pro tio ŝi komencis perlabori. Ŝi ankaŭ multe legis, aktorin ĉe amatoraj teatroj, ofte vizitadis filmojn kaj teatraĵojn. Laŭopinie ŝi estis ankaŭ bona psiĥologo. Pri Václav - al kiu ŝi edziniĝis post ok jaroj de ilia konatiĝo, devis poste ankoraŭ ses jaroj atendi kiam li dum Husaka normaligo estis kelkfoje arestita - diris kelkajn trafajn vortojn : „ Li estas absolute honesta, li faros nenion, pro kio mi povus honti „.Io alia estas liaj malĝustaĵoj - li estas tro konfidema. Elekto de iuj liaj konsilantoj ne estis por mi akceptebla. Sed Václav ĉiam vidis ĉe homoj nur ĉion bonan, estimas malnovajn amikecojn, scias pardoni pli multe ol mi.“ Kaj kion li diris pri Olga? „En Olga mi trovis ĉion, kion mi bezonis: mensajn respondojn je mia tremigo, korektiston de miaj senpripensaj ideoj, privatan helpon por miaj publikaj aventuroj La tutan vivon mi kun ŝi ĉion konsultas. Simple ni estas nur unu korpo, unu vivo.

Olga Havlová forpasis en jaro 1996.

Dagmar Havlová

Naskiĝis la 22.-an de marto 1953 en Brno. Ŝi estas populara ĉeĥa teatra, filma kaj televida aktorino. Kun Václav Havel ŝi edziniĝis en la jaro 1997. En la jaro 1997 ŝi fondis fondaĵon - Fondaĵo de Dagmar kaj Václav Havel, en kiu ankaŭ prezidas. Fondaĵo Vize 97 prizorgas kulturon, onkologion, kleradon de junaj homoj, homaj rajtoj, batalo kontraŭ rasismo.



Livie Klausová



Naskiĝis la 10-an de novembro 1943. Finstudis komercan fakultaton en Prago, fakon eksterlanda komerco. En la jaro 1966 ŝi akiris diplomon ĉe Universitato en Lucembrug. En jaro 1969 ŝi studis Eŭropan Instituton en Amsterdam. En jaroj 1994 ĝis 2000 estis sekretarino de Ĉeĥa ekonomia komunumo.

Jam kiel edzino de Václav Klaus ŝi subtenis propravolajn aktivecojn kaj stimulis la ceterajn, helpe al infanoj, suferantoj kaj maljunaj homoj. De komence kiam ekkomencis Registro de medoldonacistoj (dárcei kostní dřeň), ŝi estas ĝia honora aŭspiciino. Ŝi helpis al infanoj el Institucio por sociala zorgo en Bystřice nad Úhlavou..



Eksistas neniam fiksitaj reguloj, kion faru edzinoj de ŝtataj politikistoj kaj kiel kondukti. Publike ili reprezentas ŝtaton, kvamkam neniu leĝo, eĉ formale tion enhavas. Protokole oni kalkulas nur dum oficialaj aferoj - ekzemple eksterlanda vizito, kiam por edzinoj estas preparita speciala virina programo. Koin ili faru dum sia libera tempo estas ilia afero. Sed ĝenerale ĉiuj dediĉas sin al ajnaj bonfaroj, sed ankaŭ tio ne estas normo. Nur unu estas certa, ili devas akcepti tion, ke forestos ilia privata kaj profesia vivo.

Fotoj el Vikipedio